

La nomoj de la familianoj de Zamenhof aldoniĝis al la listo de Jad Vaŝem*

Josef Ŝemer

Fine de 2004, la israela institucio por memorigo de la Holokaŭsto, *Jad Vaŝem*, inaŭguris interretan paĝaron, kiu prezentas la nomojn de tri el la ses milionoj da judaj viktimoj de la Holokaŭsto. Jad Vaŝem konsideras tiun ĉi kampanjon kiel sanktan moralan devon kaj honorigon al la pereintoj, komplezon de la postrestintoj al la judaj viktimoj.

La intenco estas kompletigi la liston, ĝis trovado de la lasta nomo.

La kolektado de nomoj komenciĝis jam en la 50-aj jaroj, precipe inter la postrestintoj kiuj alvenis Israelon, sed en la lastaj jaroj ĝi pli kaj pli disvastiĝis en la tuta mondo.

Ĝis la lasta tempo neniu pereinta membro de la familio Zamenhof aperis en la listo. Tial Josef Ŝemer el Israelo prizorgis en 2005 la aperigon de la nomo de Lidia (Lidja) Zamenhof, la filino de L. L. Zamenhof, tre aktiva esperantistino pereinta en Treblinka. Li turnis sin al s-ino Ewa (Eva) Toren el Tel-Avivo, kiu loĝis samstrate kun Lidia en la varsovia getto kaj kiun ŝi ege admiris. Ŝi vidis en septembro 1942 Lidian suriri la vagonaron, kondukantan judojn de Varsovio al la koncentrejo Treblinka.

Li petis de Ewa permeson plenigi ŝianome la "Atestofolion" de Jad Vaŝem kaj subskribigi ŝin. Post kelkaj monatoj la nomo de Lidia Zamenhof (1904-1942) aldoniĝis al la longega listo, apud ŝiaj aliaj senkulpaj samnacionoj.

Post kelkaj monatoj, J. Ŝemer sendis al Jad Vaŝem Atestofoliojn pri tri aliaj Zamenhofanoj, murditaj de la Nazioj: Ida (fratino de LLZ), Sofia (filino) kaj Adam (filo, patro de Louis Zaleski-Zamenhof). Ekde januaro 2007 ili aperas en la listo.

Nun ĉiu Reto-hava Esperantisto povas viziti la Retejon de Jad Vaŝem kaj trovi la eternigon de la nomoj de la 6 parencoj de LLZ:

<http://www.yadvashem.org/>

(Elektu la deziratan lingvon- angla, rusa aŭ hebrea – klavu "Shoah Victims' database" kaj atingu la lokon kie oni tajpas la nomon de la viktimo. Tajpu la familian nomon "Zamenhof" ktp. Per musklakado oni povas aperigi la Atestofoliojn kun la detaloj de ĉiu viktimo.)

Aldono: Poste aldoniĝis pliaj 2 membroj de la familio Zamenhof. Krome, du Esperantistoj el Eŭropo sendis poste (memstare) Atesto-foliojn pri Lidia, do ŝia nomo aperas tie 3 fojojn...

* Konciza versio de tiu ĉi artikolo aperis en *Israela Esperantisto* 142 (2005).